

# La Laborista Esperantisto Arbetar-Esperantisten

Nr 3-4 | december 2016

N-ro 3-4 | decembro 2016

Tvåspråkig tidning utgiven av SLEA | Dulingva gazeto eldonita de SLEA



Innehåll | Enhavo

Sindikataj novaĵoj

Bortgångra kamrater

Novaĵoj de libroservo

Världsesperantokongressen i Nitra

Ni trovu novan mondan ordon en Azio

**Arbetar-Esperantisten** är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet. Tidningen drivs helt ideellt.

**La Laborista Esperantisto** estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de Sveda Laborista Esperanto-Asocio. La gazeto estas krea kaj eldonata tute senprofiteme.

**Redaktionen / La redakcio:**

Daniel Sandgren  
Marcus Hansson

**Retejo:**

[www.slea.se](http://www.slea.se)

**Retpoŝto:**

[arbetaresperantisten@hotmail.com](mailto:arbetaresperantisten@hotmail.com)

**La estraro de SLEA:**

**Prezidanto:** Daniel Sandgren

**Sekretario:** Guy Coste

**Kasisto:** Marcus Hansson

**Ceteraj estraranoj:**

Soile Lingman

Inga Johansson

**SAT-perantino / SAT-kontakt:**

Inga Johansson

Retpoŝto: [ishim@hotmail.com](mailto:ishim@hotmail.com)



541-826

Svanmärkt trycksak  
[LaserTryck.se](http://LaserTryck.se)

# Enhavo

sida / paĝo

• Gazeta informo	2
• Ledare / Redaktangulo	3
• Esperantokongresen i Nitra	4
• Laboristoj strikas ĉe Coca-Cola	6
• Lernejoj de la Movado de la Senteruloj invaditaj de la polico	7
• Mastroj de Milito	8
• Bortgångra kamarater	9
• Deklaracio de la 89-a SAT-kongreso	10
• Deklaration från den 89e SAT-kongresen	11
• Ni trovu novan mondan ordon en Azio	12
• Bonvenon al Seulo!	13
• Novaĵoj de libroservo	14

Redaktionen vill tacka alla som på något sätt bidragit till detta nummer och de som under året skänkt pengar till förbundet!

**LASTA DATO POR LA  
MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA  
ELDONO ESTAS 2017-01-31.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN  
TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER  
ÄR 2017-01-31.**

**Aper-plano 2017**

marto, junio, aŭgusto, novembro

**Adreso de SLEA:**

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet  
Box 64  
563 22 Gränna  
Sverige / Svedio

# Ledare

Äntligen kommer årets sista nummer till slut, ett dubbelnummer, då vi tyvärr inte hann med ett höstnummer. Vi har under året haft ett erbjudande för nya medlemmar och trots att färre nappade på det än vi hoppats så har vi ändå ökat något i medlemsantal! Glädjande är det också att flera är helt färska esperantister! Snart är det dags för årsmöte igen som förutom själva mötet kommer bjuda på en visning av SLEA's arkiv som finns på Arbetarrörelsens Arkiv och Bibliotek där mötet hålls. Till mötet hoppas vi kunna ha boken "Kallskänken/Malvarma bufedo" av Jenny Wrangborg klar! Vi kommer även ha vår libroservo med så det finns tillfälle att köpa både ny och gammal esperantolitteratur! Fundera gärna på vilket sätt du kan bidra till arbetet i SLEA, vi är i stort behov av fler aktiva som hjälper till att sprida språket i arbetarrörelsen! Du behövs!

Trevlig läsning och glöm inte att betala din medlemsavgift för 2017 om du inte redan gjort det!

# Redaktangulo

Finfine venas la plej lasta numero de la jaro, duobla numero. Ni ne havis tempon fari aŭtunan numeron. Ni havis dum la jaro oferton por akiri novajn membrojn kaj malgraŭ nemultaj kaptis tiun oferton (kiel ni esperis), tamen ni iom kreskis membro-nombre. Ĝojiga fakto estas, ke pluraj estas tute novaj esperantistoj. Baldaŭ tempo por nova jarkunveno. Krom la jarkunveno ni ofertos montradon de la arkivo de SLEA, kiu nun estas en Arbetarrörelsens Arkiv och Bibliotek, kie la kunveno ankaŭ estas. Preta al la jarkunveno, ni esperas, havi novan eldonon de la libro "Kallskänken/Malvarma bufedo" de Jenny Wrangborg. Ni ankaŭ havos nian libroservon, estos okazoj aĉeti kaj novan kaj malnovan literaturon en esperanto. Vi pripensu kiel vi plej bone povas kontribui kaj kunhelpi en la laboro de SLEA. Ni vere bezonas pli da aktivuloj kiuj pretas kunhelpi disvastigi en la laborista medio. Vi estas bezonata.

Agrablan legadon, ne forgesu pagi vian membrotizon 2017 se vi jam ne faris.

## JARKOTIZO | MEDLEMSAVGIFT

- Unuopa membro/Enskild medlem 100:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-
- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-
- Stödmedlemskap för organisationer 200:-

**Membriĝu / Bli medlem!**

Plusgiro 5 31 60 - 8.

(Sv.Arbeta.Esperanto-förb.)



**Atentu!**

Pri la enhavo de La Laborista Esperantisto respondas la kontribuintoj mem.

**Uppmärksamma!**

Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.

## Resan till esperantokongressen i Nitra

Precis som första gången för många år sedan tog jag tåget via Malmö och Trelleborg till Berlin. Vidare förbi Prag och Bratislava till Nove Zamky där jag bytte tåg för att komma till Nitra. Den staden ligger omgiven av sju berg, vilket kanske förklarar de praktfulla åskväder som inträffade flera gånger under kongressveckan. Om dagarna var det sol och temperaturer på över 30 grader.

Det var drygt 1.200 deltagare från 60 olika länder som samlats för att tala esperanto och lyssna till intressanta föredrag. Det är alltid spännande att se vilka gamla bekanta man återser och vilka nya bekantskaper man gör under veckan.

Det fanns ett otroligt utbud av aktiviteter med föredrag, konserter, teaterföreställningar och möten för organisationer som ateister, socialister, kommunister, fritänkare, filatelister, olika religiösa och filosofiska rörelser, icke rökare, homosexuella, språkkurser i esperanto, slovakiska, tjeckiska, Oratora konkurso = en tävling för vältalare, utflyktsdag mitt i veckan med ett stort antal alternativ. Jag valde en bussresa till den ungerska staden Esztergom på andra sidan gränsfloden Donau.



Somliga konserter förlades till stora torget för att stadens invånare skulle märka av kongressen. Sista kvällen formade kongressdeltagarna ett demonstrationståg med musik och gröna esperantoflaggor som marscherade genom staden till stora torget där festligheterna ägde rum. Nästa dag avslutades kongressen med högtidstal och slutligen sjöng alla tillsammans "La Espero" (Hoppet) ledda av den stora kongresskören.

Direkt efter att kongressen avslutats började De blindas kongress. Även synskadade som jag kan vara medlemmar i organisationen LIBE som organiserar blinda och synskadade esperantister. Det var jämförelsevis få deltagare i

år och de flesta kom från östra Europa.

På återvägen mot norr stannade jag två dagar i Dresden för att träffa Harald och hans fru Renate. Harald är son till min fars esperantobrevvän från 30-talets början. Dresden gick inte att känna igen från 1959 då jag såg staden ligga i ruiner efter det stora bombanfallet från väst i slutet av kriget. Hela det vackra centrum från början av 1700-talet med slottet Zwinger, Frauen-kirche och August den Starkes unika porslinsinsamlingar var åter-ställt i ursprungligt skick. August den Starke som var kurfurste av Sachsen och kung av Polen kallades "Solkungen av Sachsen" ty han påminde om den franske kung Ludvig XIV och hans slott Versailles.

Jag tror det var min sista kongressresa, men när jag kom hem kände jag mig mycket nöjd med att ha genomfört den.

För den som är intresserad kan jag tala om att nästa års världskongress, Universala Kongreso (UK), blir i Korea och året därpå i Portugal.



En reseberättelse av  
Soile Lingman





## Ĉinio

### Laboristoj strikas ĉe Coca-Cola

Foto Weibo: Laboristoj protestas antaŭ la uzino de Ĝilinio.

**25/11/2016**

« Ni penige laboris dum jardeko, sed ni estas venditaj en malpli ol sekundo. Monkompensoj! »

Dungitoj de Coca-Cola ekstrikis en tri urboj, post kunordigita alvoko lanĉita lundon, post kiam la fabrikisto de gasaj trinkaĵoj decidis vendi ties enboteligan aktivecon en kontinenta Ĉinio.

Coca-Cola indikis pasintsemajne, ke ĝi pretiĝas vendi sian tutan aktivecon al la hongkonga multaktiveca grupo "Swire Pacific" kaj la ŝtata grupo "Cofco", ĉina giganto pri agronutraĵo. La anonco, kiu intervenas kadre de restrukturiga aranĝo, kaŭzis koleron de la koncernitaj dungitoj: ili timas maldungojn aŭ drastajn malaltigojn de salajroj.

Tri uzinoj de la grupo, en Ĉongĉingo kaj Ĉengduo (sud-okcidente), kaj en la provinco Ĝilinio (nord-oriente), estas nun tuŝataj de la striko, laŭ koincidaj informfontoj.

Fotoj montras grandan ruĝan flagubandon antaŭ la industria konstruaĵo de Ĉongĉingo: « Ni penige laboris dum jardeko, sed ni estas venditaj en malpli ol sekundo. Monkompensoj! »

Ĉi tiu teksto estis publikigita ĉe:

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2016/11/cinio-laboristoj-strikas-ce-coca-cola.html>



Foto: Nacia Lernejo Florestan Fernandes, São Paulo, MST, pentrita muro, Foto Udi

**06/11/2016**

Brazilo spertas abundan streĉon. Studentoj okupas centojn da lernejoj por protesti kontraŭ la reformo de edukado proponita de la registaro Temer, kaj kontraŭ la buĝeta rigoreco. Tiu mobilizado eĉ kondukis al prokrasto de kelkaj ekzamenoj, kiuj devis okazi en la duagrada instruado ĉi-semajnfino. Streĉo okazas ankaŭ en la movado de la senteruloj, la MST, kies pluraj edukejoj estis invaditaj de la polico.

Interpuŝiĝoj okazis vendredon matene inter la polico kaj aktivuloj de la "Movado de la Senteruloj". La policistoj priserĉis suspektitojn en la regiono, kaj enrompis lernejon de la MST en la ĉirkaŭurbo de São Paulo. Aktivuloj rezistis kontraŭ tiu operaco, dum kiu du personoj estis arestitaj, inter kiu pensiulo, kiu ŝajne suferas pri Parkinsona malsano, laŭ atestantoj. La policistoj asertas, ke ili estis agresitaj.

Laŭ la MST, pluraj el tiuj lernejoj estis invaditaj de la policistoj ankaŭ en la Ŝtatoj Paraná kaj Mato Grosso. La MST estas tre strukturita, kaj edukejoj utilas por prepari la aktivulojn gvidi agadon kaj okupacion de teroj en la tuta lando. La polica ĉeesto estas ofte konsiderata kiel provo por kriminaligi la socian movadon.

La organizaĵo pri defendo de la homaj rajtoj "Internacia Amnestio" kondamnis tion, kion ĝi kvalifas kiel « represia kaj timiga agado », kaj denunciis ekscesan uzadon de perforto, inkluzive de pafiloj.

Ĉi tiu teksto estis publikigita ĉe:

<http://neniammilitointerni.over-blog.com/2016/11/brazilo-lernejoj-de-la-movado-de-la-senteruloj-invaditaj-de-la-polico.html>

# Mastroj de Milito

Teksto: Bob Dylan  
Originala titolo: Masters of War  
Tradukita de Jorge Camacho  
kaj István Ertl

Venu mastroj de milito  
vi kiuj konstruas ĉiujn pafilojn  
vi kiuj konstruas la mort-aviadilojn  
vi kiuj konstruas la grandajn bombojn  
vi kiuj kaŝiĝas malantaŭ muroj  
vi kiuj kaŝiĝas malantaŭ skribotabloj  
mi volas nur ke vi sciu  
ke mi povas vidi tra viaj maskoj

Vi faris nenion alian  
ol konstrui por detru  
vi ludas per mia mondo  
kvazaŭ ĝi estus via eta ludilo  
vi enmanigis al mi pafilon  
kaj vi kaŝiĝas de miaj okuloj  
kaj vi turniĝas kaj kuras for  
kiam la rapidaj kugloj flugas

Kiel Judaso antikvatempe  
vi mensogas kaj trompas  
Monda milito povas esti gajnota  
Vi volas, ke mi kredu tion  
sed mi vidas tra viaj okuloj  
kaj mi vidas tra via cerbo  
kiel mi vidas tra la akvo  
forfluanta kloaken

Vi streĉas la pafrisortojn  
por ke la aliaj ekpafu  
tiam vi trankvile rigardas

kiel la mortkalkulo iĝas pli alta  
vi kaŝiĝas en via domego  
dum la sango de la junuloj  
fluas ekster iliajn korpojn  
kaj entombiĝas koten

Vi alĵetis la plej aĉan timon  
iam ajn ĵeteblan  
timon venigi infanojn  
en tiun ĉi mondon  
ĉar vi minacas mian filon  
nenaskitan kaj sennoman  
vi ne meritas la sangon  
kiu fluas en viaj vejnoj

Kiom mi scias  
por paroli ekstervice  
vi dirus ke mi estas juna  
vi dirus ke mi senspertas  
sed unu aferon mi scias  
kvankam mi pli junas ol vi  
eĉ Jesuo neniam  
pardonus kion vi faras

Permesu al mi demandi vin  
ĉu via mono tiom bonas?  
ĉu ĝi pagos vian pardonigon?  
ĉu vi pensas tion ebla?  
Mi pensas, ke vi malkovros  
kiam via morto postulos repagon  
ke la tuta mono akirita  
neniam elaĉetos vian animon

Kaj mi esperas ke vi mortos  
kaj ke via morto venos baldaŭ  
mi sekvos vian ĉerkon  
en la pala posttagmezo  
kaj mi vidos dum vi estas malhisataj  
sur vian mortkuŝejon  
kaj mi staros sur via tombo  
ĝis mi certos pri via morto





## *Bortgångna kamrater | Forpasintaj kamaradoj*

---

**Winston Sager**  
(född Nilsson)

Huskvarna

Medlem i SLEA under många år. Även medlem i SAT.  
Aktiv i Huskvarnaklubben när den fanns.

1920-05-16

2016-10-16

**Tomas Jansson**

Stockholm

Läkare, antikvariatbokhandlare, medlem i SLEA och SEF.

1951-02-18

2016-10-26

*Vila i frid | Ripozu en paco*

# Deklaracio de la 89-a SAT-kongreso

okazinta en Herbergo ĉe Harco (Germanio)  
de la 16-a ĝis la 23-a de Julio de 2016

## SAT:

- kontraŭas la militojn kaj denuncas la atencojn ĉie en la mondo.
- maltrankviliĝas pri tiom da senlaboruloj kaj laboristoj kun rubokontraktoj, eĉ en landoj laŭdire evoluiĝintaj, kaj konscias pri la suferoj kaŭzitaj de la rezultanta malsufiĉo de la salajro.
- tre bedaŭras kreskon de naciismaj partioj kaj movadoj en multaj landoj.
- kritikis la plejparte trankviligan reagon de la Eŭropaj registaroj al la sendemokratiigaj agoj de pluraj ŝtatoj, aparte de la Turka.
- kondamnas la komplicecon de multlandaj firmaoj kaj interesataj registaroj en la fakta forrabo de raraj resursoj, kio kontribuas al internaj kaj internaciaj armitaj konfliktoj en Afriko, Mezoriento kaj Sudameriko.
- kulpigas la koncernatajn registarojn pro livero de armiloj al militantaj landoj en Mezoriento, Afriko kaj ĉie tra la mondo.
- emfazas la postulon de SAT bonvenigi enmigrantojn kaj rifuĝintojn kaj respekti la rajton de homoj cirkuli kie ajn, konsciante ke la multaj militoj kaj malbonaj vivkondiĉoj en kelkaj lokoj de la mondo malebligas la vivon en tiuj lokoj.
- kontestas la distingon ofte voĉitan de politikistoj kaj gazetaro inter bonaj militrifuĝintoj kaj malbonaj bonvivemuloj, kiuj laŭ ili nur venas al la riĉaj landoj por ĝui laŭdire nemerititan agrablan vivon.
- subtenas la ideon, ke homaj rajtoj kaj tutmondaj agadoj ne estas limigitaj de landlimoj kaj ke homoj rajtas kaj devas unuiĝi por defendi similajn vidpunktojn kaj kune lukti kaj agadi.
- reemfazas sian zorgemon rilate urĝecon de la ekologia situacio, ligita kun klimataj perturboj rezultantaj grandparte de homa agado kadre de kapitalisma kreskismo, kaj alvokas al konsiderado kaj ekutiligo de alternativoj, ĉu laŭ individua, ĉu laŭ kolektiva povo, kaj sur loka, kaj sur monda skaloj.
- atentigas pri la fandiĝo de la glaĉeroj en multaj regionoj kaj la endanĝerigo de multaj vivoj.
- rimarkas, ke troa kaj ekologidamaĝa transportado estas kaŭzata ne nur de malbona planado kaj konsumado, sed ankaŭ pro uzo de malaltpagataj laboristoj en foraj lokoj,
- malakceptas la venenadon kaj la minacon per atomenergio kaj atomaj armiloj sur nia tuta planedo.
- subtenas plivastigon de vera « justa komerco », kiam ekologia kaj « justa » produktado ne eblas surloke.

# Deklaration från den 89e SAT-kongressen

som ägde rum i Harzberg vid Harz (Tyskland)  
den 16 till den 23 juli 2016.

## SAT:

- är emot krig och fördömer alla attacker i världen.
- oroas av att arbetslösa och arbetare har skräpkontrakt även i länder, som enligt utsago är moderna. Vi är medvetna om det lidande som otillräckliga löner bidrar till.
- tycker det är sorgligt att nationalistiska partier och rörelser växer i många länder.
- kritiserar de till största delen lama reaktionerna från europeiska regeringar mot antidemokratiska handlingar utförda av många stater i världen, detta gäller i synnerhet Turkiet.
- fördömer de internationella företag och delaktiga regeringars medbrottslighet till den verkliga utsugningen av naturresurser, som bidrar till interna och internationella väpnade konflikter i Afrika, Mellanöstern och Sydamerika.
- anser att medskyldiga är de företag och dess styrelser, som förser konflikterna med vapen.
- understryker kravet på att man välkomnar flyktingar och emigranter, och respekterar människors rätt att fritt förflytta sig, medveten om att de många konflikter och krig, som råder på vissa platser, gör dessa obeboeliga.
- ifrågasätter den skillnad som vissa politiker och tidningar gör, när man påstår att det finns ”goda flyktingar” som flyr från krig och ”dåliga flyktingar” som påstås vara lyckasökare, som endast kommer till rika länder för att orättfärdigt leva gott.
- stödjer idén om att mänskliga rättigheter inte ska vara begränsade av landgränser. Att människor måste och ska ha rätt att enas och kämpa tillsammans för sina rättigheter.
- vill understryka sin vilja till handling gällande den hotande klimatkrisen, som till stor del är orsakad av människors handlingar och ökad kapitalism. SAT kräver en utvärdering av alternativen, att efter kollektiv likväl som individuell förmåga hitta alternativ på lokal, regional och global nivå.
- är medveten om att glaciärerna smälter på många platser och att detta är ett hot mot livet.
- ser hur de miljövidriga transporterna inte bara orsakas av dålig planering och konsumtion, utan även av extremt lågavlönade arbetare på avlägsna platser.
- accepterar inte någonstans på vår planet, gifterna från atomenergi och kärnvapen.
- stödjer spridningen av verklig ”rättvis” handel när ekologisk och ”rättvis” produktion inte är möjligt lokalt.

# Ni trovu novan mondan ordon en Azio

La mondo nuntempa kaosas. Tie kaj ĉi tie senĉese eksplodas malpacoj pro diversaj kialoj ekz. religiaj, kulturaj, ekonomiaj, tiuj de politikaj profitoj k.t.p. Pligrandiĝas la malegaleco ekonomia inter la riĉuloj kaj la malriĉuloj kaj inter la riĉaj landoj kaj la malriĉaj. Ankaŭ en Azio ni trovas tute saman situacion.

Oni diras, ke la evoluiga motoro de la monda ekonomio nun translokiĝis de Eŭropo al Azio. Kompreneble ne nur en la ekonomio, sed ankaŭ en la kampoj politika, kultura kaj aliaj. La SAT-Kongreso, kiu okazos venontjare en la Korea Respubliko, ankaŭ esperas trovi novan mondordon, kiu povos servi al la homoj plej ordinaraĵoj en kaj ekster Esperantio.

Venu al la Korea Respubliko, kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo, kaj trovu novan manieron por la homaro!

Prepara kunsido de koreaj SAT-membroj por la 90-a kongreso.



# Bonvenon al Seulo !



La 90a kongreso de SAT okazos en 2017 en Gimpo apud Seulo inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto.

Ĝi estos la tria SAT-Kongreso ekster Eŭropo post tiu de 1973 en Toronto kaj tiu de 1988 en Campos do Jordao.

Jen ligo al la kongresa retejo:

<http://sat90.org/>



## Vad heter snösläde på esperanto?

Vi har fått en fråga från en medlem om vad "snösläde" skulle kunna tänkas heta på esperanto. Alltså en snösläde som man skottar med och inte en släde man åker på, se bild.

Vi tar tacksamt emot förslag och åsikter om detta. Kontakta oss antingen via vår postboxadress eller vår e-post: [arbetaresperantisten@hotmail.com](mailto:arbetaresperantisten@hotmail.com)

# Novaĵoj de libroservo de SLEA

## Libroj



### **Lilla esperanto-ordboken** (Ny reviderad upplaga)

- Ebbe Vilborg

Tvåvägs fickordbok, svenska–esperanto, esperanto–svenska. Tredje upplagan, 2016, med många nya ord inom framför allt områden som rör datorer, mobiltelefoni, mat och musik.

Dudirekta poŝvortaro sveda–esperanta, esperanta–sveda. Tria eldono, 2016, kun multaj novaj vortoj precipe en la sferoj komputiloj, poŝtelefonado, manĝoj kaj muziko.

Eldoninto: Eldona Societo Esperanto | Esperantoförlaget

Prezo: 100 kr



### **La Progresema Esperanto-movado en perspektivo**

- G. P. de Bruin, Glodo, Banje, Barthelmes

Represo de du libroj pri la historio de SAT: "Laborista Esperanto-movado antaŭ la mondmilito" de Gerrit Paulus de Bruin (1936) kaj "Historio de SAT 1921-1952" (1953).

Eldoninto: La eldona fako kooperativa de SAT


Prezo: 130 kr

## SAT-kotizo 2017 | SAT-avgift 2017

Pagu vian SAT-kotizon al plusĝiro de SLEA 5 31 60 -8

2017 Plena kotizo SEK 520:-

2017 Duona kotizo SEK 260:- (senlaboruloj, familianoj, emeritoj kaj junuloj)



## Vivo de Zamenhof

- Edmond Privat

Klasika biografio de Zamenhof, kun priskribo de liaj filozofiaj, lingvaj kaj movadaj ideoj kaj agadoj.

Eldoninto: UEA

Prezo: 80 kr



## Klaŭda kaj la rivera sekreto

- Aitor Arana

Rakonto pri knabino, kiu volas ludi futbalon en epoko, en kiu tio ne eblas, nur ĉar ŝi estas knabino.

Eldoninto: Erroteta

Prezo: 100 kr

## Diversaĵoj



### Stelo tola

Esperanto - lingvo internacia

Flava kaj ruĝa rando kun "Esperanto -- lingvo internacia"; verda stelo sur blanka fono

Dimensio: 7,8 cm

Prezo: 35 kr

Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:

Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:

### Retpoŝto:

slea.smolando@hotmail.com

### Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet  
Box 64  
563 22 Gränna  
Sverige / Svedio

Afrankoj aldoniĝas je sendo de  
libroj/broŝuroj/ diversaĵoj.

Plusgiro: 53160-8

(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

## LÄR DIG ESPERANTO!

Esperanto är ett planspråk vars främsta syfte är att underlätta kommunikationen för människor med olika språkbakgrund. Detta "brospråk" är relativt lätt att lära sig på grund av sin regelbundenhet och flexibilitet. Då esperanto inte tillhör någon nation eller något folk är det även mer rättvist att använda än de nationella språken.

## ETT FUNGERANDE SPRÅK!

Ett språk dugligt för alla ändamål kan endast uppkomma ur en kollektiv process. Esperanto tillhör och formas av sina användare. Esperanto har använts i över 100 år och används idag i växande omfattning på internet. Dess användare finns idag i hela världen.

## FÖR DEMOKRATISK KOMMUNIKATION!

Alla som har erfarenhet av internationell kommunikation vet att språket kan vara ett hinder, men med hjälp av esperanto kan vi umgås som jämlikar.



**Svenska ArbetarEsperantoFörbundet**  
Sveda Laborista Esperanto-Asocio

Box 64  
563 22 Gränna  
Sverige | Svedio



[www.slea.se](http://www.slea.se)